# OKULTISMO

*En vendredo en la 22.2.2008 la ĉeĥa kristana televidstacio TV NOE elsendis programon „Otazníky“ – Demandosignoj. Moderisto de la interparolo ĉe la ronda tablo estis sac. Martin Holík, direktoro de la ĉeĥa kristana radiostacio Proglas kaj gastoj estis sac. Vojtěch Kodet Ocarm, ThD-ro, ĝenerala delegito de ĉeĥa ordeno de karmelanoj (ekzorcisto) kaj sac. Jaroslav Brož, ThD-ro, S.S.L., bibliisto el praga Katolika Teologia Fakultato. Temo de la interparolo estis Okultismo. Post enkonduka ekspliko ili respondis demandojn de la demandantoj. Ke tiu ĉi temo estas tre aktuala, pri tio atestis pli ol 150 demandoj de la spektantoj.*

## Kio estas Okultismo?

La vorto „okultismo“ devenas el latina vorto „occultus“ kaj signifas sekreta, kaŝita, sekretigita. La okultismo prezentas spiritan instruon kunigitan kun specifaj kapabloj, en kiu la homoj serĉas aŭ ekkonon aŭ povon el alia fonto ol el Dio. Temas pri la sekreta aŭ kaŝita instruo, kiu okupiĝas pri transcendaj fenomenoj, kiujn oni ne povas science ekspliki. Ĉiu okultisma instruo eliras el la konvinko, ke en la mondo krom racie ekkonitaj fortoj ekzistas ankoraŭ aliaj nekonataj fortoj, kiujn la homo povas iamaniere utiligi kaj ilin regi helpe de magio aŭ sekreta praktikeco, kaj tiel akiri superregadon super aliaj homoj aŭ objektoj. Per tiuj ĉi praktikadoj celantaj la sekretan ekkonon aŭ potencon la homoj sin malfermas al efikado de la malbonaj spiritoj, eĉ se ili tion ne konsciiĝas kaj ofte havas la senton, ke ili faras nenion malbonan. Ĉiuj kristanaj eklezioj rigardas kiujn ajn formojn de la okultismo kiel pekajn kaj damaĝantajn al la homo sur lia vivovojo. La Sankta Skribo de la Malnova kaj ankaŭ de la Nova Testamentoj pri tio parolas tute klare:

**Malnova Testamento:** Eli 7,8+ – egiptaj sorĉistoj; Rea 18,9+ – kontraŭ aŭguristoj, antaŭdiristoj, magiistoj, sorĉistoj, subĵurigistoj, elvokistoj de spiritoj; Jes 47,12+ kontraŭ desorĉado, magiaĵoj, astrologio; Hoŝ 4,12 – demandi la lignon, idoladorado kiel spirita malĉateco;

**Nova Testamento:** Ago 8,9+ – Samario kaj Simono sorĉisto; Ago 16,16+ – Filipi kaj aŭguristino; Ago 19,15+ – desorĉisto en Efeso; Gal 5,19-21+ faroj de la homa arbitreco: malĉasteco, malpureco, voluptemo, idolkulto, sorĉado, malamikeco, skismoj, herezoj, envioj, ebrieco, diboĉado ktp.

**Katekismo de la Katolika Eklezio:** paragrafoj: 675, 1852, 2115, 2116, 2117, 2138.

## Kial pri la okultismo interesiĝas la eklezio?

Ĉar ĝi devas, ĉar ĝi renkontas la homojn trafitajn per okultismo. Estas tio konsista parto de la animzorgado pri la homoj, kiujn Dio konfidis al ĝi. Ni parolas pri la okultismo, ĉar per ĝi estas fascinataj homoj ĉirkaŭ ni, precipe la junaj homoj. Tiun problemaron oni renkontas kaj en la Biblio, kaj ĉe la eklezíaj patroj. Ĝi estas tento malnova, kiel mem la homaro. Al magio kaj sorĉarto oni ofte esprimas eĉ iun gradon de respektindeco kaj scienceco. Plejmulto de gejunuloj (jam eĉ la infanoj en la lernejo) kontaktas tiun zonon pli ofte pro scivolemo, enuiĝo aŭ sensaciemo, alifoje pro sopiro havi la potencon super iu aŭ io; pere de ezoterika kaj satanisma muziko aŭ drogoj. Iam estas la intereso pri la okultismaj praktikoj elprovokita per propra necerteco, timo kaj serĉado de propra identeco, per serĉo de respondoj pri la senco de la vivo.

## Konkretaj versioj de la okultismo en la nuna tempo

Magio (blanka kaj nigra), spiritismo, kuracado (ĝi ne estas karismo de la resanigado), satanismo, movado Nova Epoko (New Age – spirita orientado celumanta kontraŭ kristanismo, instruo pri reinkarnacio – reen-

karniĝo), channeling – akceptado de la kosma energio, malbeno, sorĉarto (kartodivenado, aŭgurado), demandi svingileton, divenvergon kaj spiralon, aŭgurado, astrologio, horoskopoj, telepatio, numerologio (aŭgurado helpe de numeroj), idolado – adorado de falsaj diaroj, metodo de Silva, reikli (kuracmetodo – malfermado de ĉakroj...), haĝio, blua alfo..., alternativa medicino (homeopatio, psikotroniko, pozitiva pensado, makrobiotiko...), ritualoj de keltoj, transcedentala medito, jogo – kiel spirita vojo... ktp. La okultismaj praktikadoj ĉiujare alkreskas.

### Kial estas la okultismo danĝera?

Temas pri **la pekoj kontraŭ la 1-a Dia ordono**. Dio estas ununura fonto de la vivo. Kiu ajn idolkulto pereigas la vivon en ni, tial la Biblio parolas pri Dia ĵaluzo pro Lia bildo en ni. Per kontakto kun okultismo kaj **ĝia praktikado la homo malfermiĝas al malhelaj fortoj**, kiuj detruas la vivon de la homo kaj lian mision. Ĝi senigas la homon de libereco, kiun al li donacis Dio.

Tio rezultos en lia vivo ankaŭ per konkretaj signoj kaj simptomoj: **Spiritaj malfacilaĵoj** *(spirita malvigliĝo, antipatio por la interna preĝo, por legado de la Biblio, blasfemaj pensoj, ridindigo de la karismoj, agreseco kontraŭ Sankta Spirito...);* **Instigado** *(al la sinmortigo, al ŝtelado, al memturmentado, krimaj inklinoj, malpuraj pensoj, imagoj...);* **Difektitaj rilatoj** *(en familio,malfideleco en geedzeco, manko de kompato al la malfortuloj kaj maljunuloj, nekapablo ekligi amikajn rilatojn...);* **Dependecoj** *(je alkoholo, drogoj, komputilo, komputilaj ludoj, aŭtomatoj, pornografio, sodomio, seksa perversio, masoĥismo, sadismo, ektrema memkompato kaj sentimentaleco);* **Timoj kaj fobioj** *(antaŭ malsanoj, maljuniĝo, morto, mallumo, tombejo, estonteco, insektoj...);* **Psikaj problemoj** (*depresioj, sopiro pri la morto, halucinacio, laciĝa sindromo, psikaj malsanoj, kiujn kuracistoj ne kapablas kuraci),* **Altireco de la okultaj kaj magiaj aferoj, inklino al mistikismo** *(inklino al tombejoj, al mallumo, okulfrapa inklino al nigraj vestaĵoj, altira forto al esoteriko kaj sekretaj instruoj...)*.

### Kio estas Malbono?

Malbono estas manko de bono, malpleneco. Malbono ne estas produktaĵo de nia psiko. La homo estis kreita por bono. Malbono estas je la homo sendependa persono, povanta trompi la homon, kaj povanta la homon eluzadi por siaj celoj, sen ke tion la homo scias. Ankaŭ la homo, kiu kunlaboras kun Malbono, povas ekstervide fari bonon. Ĉi tie validas la biblia *„Per iliaj fruktoj vi konos ilin“.*

La homo, precipe la kredanta, devus scii, ke malantaŭ ĉiuj magiaj fortoj estas Malbonulo (demono), kiu per tiuj praktikadoj malhelpas al la homo trovi kaj akcepti Dion. Kun Malbonulo renkontiĝos pli facile la homo, kiu klopodas imitadi Dion kaj plej ofte **per formo de tentoj** kaj intrigoj.

La Malbonulo volas forlogi la homon el la vojo al Dio, metas al li sur la vojon malagrablajn obstaklojn kaj la homo, se li preteratentas la tenton, sin inklinas al diversaj dependecoj kaj kateniĝoj (alkoholo, narkotismo, ludaj aŭtomatoj, porno, sekso ktp.). **Signo de la kateniĝo estas malemo al la admono kaj obstinado en sia vero.** La Malbonulo ĉiam strebas al la homo malgrandigi spacon de lia libereco. La Malbonulo prenas al la homo liberecon kaj konvinkas lin, ke li agas ĝuste. Kiu estas jam subigita al la Malbonulo, tiun li lasas senĝene. Sed se la homo fordonos sin al li, li ne plu kapablas mem helpi al si, li bezonas helpon. **Ni, kiuj konas Dion, estas devintaj informi la aliulojn, averti ilin, atentigi ilin pri la danĝero kaj konsekvencoj.** La informo estas tre grava, ĉar ni konas tragikan rolon de la Malbonulo, sekvojn por la familio kaj ĉirkaŭaĵo. Precipe la pastroj, kiuj estas vokitaj al la heroldado

de la evangelio, respondsas por la kredantoj eĉ en tiu direkto.

**Novpaganismo** – estas nuntempe la plej ofta vivstilo – pseudoreligio, sektoj. Uzado de la okultismaj praktikoj en Ameriko kaj en Eŭropo. Meditadoj, kiuj estas imitaĵoj de la orientaj religioj. Transcedentala meditado estas speciale danĝera! Tio ne signifas, ke ĉio, kio estas el Oriento, estas malbona, povas tie esti eĉ grajno da vero.

**La problemo tio estas por la kristano, kiu jam konas Kriston kaj Sanktan Spiriton – se li sin turnos al la orienta religio, ĝi verdire estas apostazo – turno for de Dio, de la eklezio.**

La kristana meditado devas ĉiam esti orientita al la persona Dio kaj antaŭ ĉio pere de Jesuo Kristo. La papo Benedikto la 16-a diras, ke ankaŭ la uzado de naturaj kapabloj de la racio, filozofio (grajnoj da vero), ankaŭ povas la homon alkonduki al ununura, persona Dio.

**En kio enestas kerno de la danĝero** kaj kial estas praktikadoj de la okultismo malpermesitaj? Strukturo de la vivo ne baziĝas sur sciavido de la sorto, sur estonteco, sed sur ĉiutaga fido al Dio, en lia gvidado dum la tuta nia vivo. Ni havas la devon de honorado kaj adorado de Dio. Kiu praktikas idolkulton (ĝi estas deturnita flanko de la kulto al Dio) pekas kontraŭ la 1-a Dia ordono kaj sin forturas de Dio – li sin starigas kontraŭ Dio. Tio havas fatalajn konsekvencojn por la tuta vivo de la homo. Oni tion ĉe li ekkonas laŭ perdo de la preĝkapableco, laŭ nelegado de la Biblio, difekto de la familiaj rilatoj, spirita malvigliĝo kaj malpleneco. Tio estas malbeno, kiu ekestas ĉe sinmalfermo al Malbonulo. Perdo de la homlibereco evidentiĝas iom-post-iome en obsedo (de pensoj, gestoj, uzado de vulgaraj vortoj, supernutrado, ĝis al alkoholdependeco, narkotismo ktp.). La homo havas en si la forton, kiun li ne kapablas regi, ekestas depresioj, fobioj, tento al memmortigo ktp. Ĝi similas al la psikaj difektoj kaj ĉe tio la kuracistoj ne estas kapablaj tion kuraci. Antaŭ ĉio temas pri danĝero de la eterna vivo de la homo. Ĉi tie estas nur du eblecoj: la eterna savo – la eterna vivo kun Dio, aŭ la malo – la eterna damno.

**El demandoj kaj respondoj:**

**1. Demando al svingileto, divenvergo kaj spiralo?**

Ĝuste la uzado de tiuj objektoj por **demandado el kiuj ajn kaŭzoj estas okultismo.** La homoj ne konsciiĝas, ke la vergo (ligno) ne povas respondi, sed ĉiam estas malantaŭ tio iu, kiu respondas. La homo ĉe la demandado ebligas al la mallumaj fortoj eblecon respondi. Li malfermiĝas al la fortoj, kiujn li poste ne kapablas regi. Psikotroniko estas ankaŭ okultismo.

**2. Homeopatio?**

La opinio pri homeopatio el vidpunkto de kristanismo estas tiu, ke malantaŭ ĉiu homeopatio estas spirito de Malbono. Ĉiu ekzorcisto tion povas konfirmi. La homeopatio kontinuas kun alternativa medicino kaj kontinue ligiĝas al kuracado. La homo opinias, ke ĉar tio kaŭzas bonon, resaniĝon, devas tio esti Dia. Se io devas esti Dia, devas tio esti Dia dekomence, meze kaj eĉ fine. Kaj tio ĉe tiu kuracado ne estas. La kuracado estas realeco, kiu malantaŭ si havas mallumajn fortojn (ĝi demandas kaj transdonas energion). La kuracanto gvidas la homon al dependeco je li. La homo ne estas kuracata, sed estas forigataj nur simptomoj de la malsano, ne mem la malsano. La praktikado de tiu ĉi kuracado kaŭzas dependecon kaj kondukas al malfermiĝo al Malbonulo. Povas okazi kunkatenigo ankaŭ pere de homeopatiaĵoj (krom tio ili estas tre multekostaj, diluita neniaĵo).

**3. Kunligiteco pere de komputilo?**

Interreto kaj komputilo estas enirporde-

go al spirito de Malbono. Pere de ili okazas granda kunkateniĝo ĉe praktikado de diversaj ludoj, porno, perfortoj ktp. La homo vivas en la mondo de virtualeco, en la mondo de revoj, li vivas la vivon, kiu ne ekzistas, kaj ne vivas, eĉ ne kapablas vivi la realan vivon.

**4. Malbenoj kaj gentaj ŝarĝoj?**

Malbeno estas malo de beno. La malbeno kaj kun ĝi ligitaj gentaj ŝarĝoj estas plua negativa sekveco, kiu povas influi vivon de la tuta familio ĝis kelkaj generacioj, kiel ni legas en la Biblio. Al la instruo pri la beno kaj malbeno apartenas en la tuta Biblio grava loko (beno en ĝi aperas 410 foje kaj malbeno 230 foje). Dio estas fidela al sia kreitulo. Tial la beno estas tre grava. Unu el la kaŭzo de la surkruca morto de Jesuo estis forigo de la malbeno super la homo falinta en la pekon kaj morton kaj ĝian ŝanĝon je beno. Dio kreis la homon kiel supron de la tuta Kreitaro sur la Tero, kaj benis ĝin, difinis la vojojn, per kiuj devas la beno disvastiĝi. Strado por la Dia amo estas la familiaj ligoj. Bazo estas la Dia amo – graveco de la amo en la familio. La homo estis invitita kiel kunlaboranto de la Dia amo kaj la peko tion ĉesigis. La plej grandan parton de la ŝarĝo akiras la homo jam en antaŭnaska aĝo, en infanaĝo. La plej ofta fonto de la malbono, kiu transportiĝas el generacio al generacio, estas malbeno kaj ĝiaj sekvoj. La malbeno estas malfermo de la vojo por deformigo de la homo – por deformigo fare de Malbono. La Biblio parolas pri du vojoj kaj pri la elekto de tiuj vojoj. Ĉiu homo respondecas pri sia vivo, pri siaj agoj, sed en la vivo li portas ankaŭ certajn sekvaĵojn el la agoj de siaj antaŭuloj. **Sed li havas respondecon por tio, kiel sin defendi kontraŭ ili, kiel halti tiun fatalan heredaĵon de siaj antaŭuloj.** Malbono de la okultismo de la antaŭuloj sin transportas sur pluajn generaciojn. Dio tion allasas, ĉar tio estas libereco de la elekto de la homo. Dio allasas eĉ la pekon de la homo, por ke Li estu ankoraŭ pli glorigita. Sed, kie disvastiĝis la peko, tie sin montras ankaŭ la Dia Mizerikordo. *Tiel ekzemple en la tria generacio iu ricevos donacon de la kredo, ricevos gracon kaj pekkonfesos, petas por la pardono kaj estas celebrataj la sanktaj mesoj (por la mortintoj, por la konscie abortigitaj infanoj eĉ spontanee, por la mortinto sen viatiko), se tion ĉi ĉion la homo konfide metos en la manojn de Dio, ekestas interpaciĝo en tiuj generacioj kaj pere de tiu ĉi ununura homo, Dio forigos malbenon de la tuta gento.*

Diablo estas simio de Dio, li ne havas proprajn projektojn. Sed li estas inteligenta kaj li scias, kiel rilati al la homo, li scias pri lia inklino al bono. Tial li proponas al la homo partan aŭ ŝajnan bonon, por lin forlogi el la vojo al Dio (pere de potenco, mono, sukceso, sano, feliĉo ktp.). Kiu ne dezirus esti sana, feliĉa sukcesa kaj riĉa? Tio ĉi ĉio ne estas malbona, sed povas ĝi la homon forlogi el la vojo al Dio, se li ne estas forte ankrita en Dio.

**Ĉiu malbeno havas sian kaŭzon.** Absoluta parto de la malbenoj falos sur la homojn sen ilia konkreta kulpo. Ili fariĝos viktimo de la malbeno, eĉ se nenion malbonan ili faris. Ĉiu malbeno blokas Dian benon kaj kaŭzas multajn malfeliĉojn en la familio. La malbeno povas esti kaŭzita de iu, kiu la familion malbenis (kaj ĝiaj familianoj ne estis ŝirmitaj per Dia graco kaj preĝo), aŭ ĝi estas kaŭzita per la pekoj de la antaŭuloj. Ĝuste la pekoj de la antaŭuloj kaj antaŭ ĉio la okultismo povas kaŭzi ion, kion ni nomas gentaj ŝarĝoj. Tiuj poste povas havi diversan aspekton de la ĉeesto de la malbono en la familio dum multaj generacioj: *alkoholo, abortigoj, perforteco, malfideleco, divorcoj, strangaj malsanoj, difektoj de la dormo, t.n. laciga sindromo, difekto de akceptado de*

*manĝoj, ripetantaj oftaj mortoj, sinmortigoj, gravaj kronikaj difektoj, psikaj ŝarĝoj kaj malsanoj, kiujn la kuracistoj ne kapablas kuraci, ...).*

**A. Malbono de ekstere.**

Povas okazi, ke iu nin malbenos. La plej gravaj malbenoj ekzistas en familioj (inter la gepatroj kaj infanoj). Bedaŭrinde ĉiam tio funkcias, kaj ĝi estas grava peko. En la familio estas tio pli forta, ĉar tie ekzistas pli fortaj interligoj. Idolkulto aŭ murdo metas la malbenon sur tutan familion. Ekzistas ebleco akiri malbenon ankaŭ per tio, ke iu al mi donacas malbenitan objekton *(povas tio esti eĉ statueto de V. Maria aŭ Sinjoro Jesuo),* diversaj ŝtonoj, amuletoj. Ju pli ĝi estas efikanta, sed pli ĝi estas danĝera. Nuntempe oni parolas pri la energio – ĝi estas kaŝita formo de magio, per kiu la homo ŝarĝas sin mem kaj la tutan familion. La homoj donas konfidon al io aŭ iu alia ol al Dio.

Se ekestas veraj problemoj en la familio, poste estas necese serĉi, kio estas ĝia kaŭzo, kaj per kio ĝi estiĝis. La homoj devus teniĝi singardeme kaj ĉion starigi sur la vorto de Dio.

**B. Malbenoj niakulpe.**

La malbenon en la vivo ni povas mem alkonduki ankaŭ per ripetantaj pekoj, precipe per la idoladorado *(do ankaŭ per okultismo kaj spiritismo)*, per malestimo de la gepatroj kaj per perfoto rilate al malfortuloj *(precipe per libervola abortigo aŭ murdo, per perversa sekspraktikado, drogoj, alkoholo...).*

Kiel tion solvi? La plej bona prevento estas la viva kredo – kuniĝo kun Jesuo Kristo. Eluzadi ĉiujn rimedojn de la eklezio (sakramenton de pekkonfeso, eŭkaristion). Konstrui je kunligo kun Jesuo pere de baptosakramento – tiu estas grava. Per la bapto estas la homo elŝirita el la povo de la Malbonulo, li fariĝas infano de Dio, li iĝas konsistaĵo de la korpo de Kristo.

Ĝi estas mirinda donaco. Kion povas la homo fari unue? Turni sin al Kristo, pekkonfesi kaj peti pri malligo de tiuj aferoj, peti pri resanigo de la internaj vundoj, se ili tie estas. Se iu konfesos al la pastro en sakramento de la pekkonfeso, ke li praktikadis okultismon, devas sekvi la preĝo de la pastro por malligo – nuligo de la malbeno kaj inviti lin ree esti infano de Dio. Ankaŭ preĝgrupoj povas intence de tiuj homoj preĝi.

**Kial pastroj ne parolas pri okultismo?**

Ĉiu pastro plej volonte kaj prefere parolas pri la Dia amo. Se estas la pastro, kiu amas Dion, kiu ĝojas pro la Vorto de Dio, havas kompaton kun aliulo – kompaton de Jesuo, li volas paroli pri la aferoj pozitivaj, pri la vivo kun Dio, pri la forto de la Dia Vorto ktp. Kompreneble, sub premo de tio, kio okazadas en la socio, li devas interesiĝi ankaŭ pri tiuj aferoj negativaj. Jam el la Biblio (el komisio de la apostoloj fare de Jesuo) havas la pastroj taskon disvastigi regnon de Dio – prediki, instrui, sanigi, liberigi – tio estas esenco de la heroldado de la Dia vorto kaj ĝia praktikado, tio estas la temoj, kun kiuj ili devas iri inter la homojn.

**Kion povas fari la homo, kiu (senkonscie aŭ konscie) sin malfermis al Malbonulo?**

1. Fordoni sian vivon al Jesuo Kristo.

2. Pentofari pro tio, kion li faris (pekkonfesi), pardoni al aliuloj.

3. Rezigni pri tio, kion li faris, forĵuri Malbonulon, kiu pekigis lin.

4. Peti pri la liberigo kaj nuligo de la malbeno – iam oni devas esti el la malbeno kaj dependeco je la malbono malligitaj fare de iu alia.

5. Sanigo de la familia gento (radiko) – la sankta meso por resanigo.

**Alpreniĝi al Bonulo, al Dio, tio estas la plej valora, kion ni povas fari – konservi la kredon, ĉar per tio ni estas ŝirmataj.**

*Amataj, kredu ne al ĉiu spirito, sed provu la spiritojn, ĉu ili estas el Dio; ĉar multaj falsaj profetoj eliris en la mondon. Jen kiel vi ekkonas la Spiriton de Dio: Ĉiu spirito, kiu konfesas, ke Jesuo Kristo venis en la karno, estas el Dio; kaj ĉiu spirito, kiu ne konfesas Jesuon, ne estas el Dio; ĉi tiu estas la spirito de antikristo, pri kiu vi aŭdis, ke ĝi venas; kaj nun ĝi jam estas en la mondo. (1Joh 4,1-3).*

**Braveco en kontraŭagoj**

La Biblio parolas pri la tento kiel pri la provo de Dio, dume la homo neniam estas provata super siajn fortojn. Dio neniam forlasas siajn infanojn. Ofte Li allasas tentojn kaj krucojn, por ke ni per iliaj superadoj kresku. Kiam la animo venkas la tenton, kreskas ĝia amo al Dio, plimultiĝas la ĝojo eĉ la meritoj por fideleco al Kristo.

La homo estas konstante tentata de la **diablo**, de la **spirito de tiu ĉi mondo** kaj **per si mem** en sia malforteco. Por ne malvenki al tiuj tri tentoj, ni devas peti pri la **graco**, por ke ni ekkonu **ruzecon** de tentanto, **vantecon** de tiu ĉi mondo kaj fine **malfortecon** de nia falinta natureco. **Preĝo, medito pri la evangelio, sakramentoj kaj ekzemplo de nia Sinjoro** estas konstante por nia dispono, por helpi al ni venkadi la tentojn, tiel kiel Li ilin venkis sur la dezerto. Sed ankaŭ ni devas atenti, por ke **ni nin mem ne disponadu al la tento kaj la danĝera okazo al la peko**.

La plej bona maniero, kiel toleri la krucojn kaj spiti la tentojn, baziĝas en tio, ke ni tute apogas nin je Kristo: *Venu al mi ĉiuj, kiuj estas laborantaj kaj ŝarĝitaj, kaj mi vin ripozigos (Mat 11,28). En la mondo vi havos suferadon, sed kuraĝu, mi venkis la mondon (Joh 16,33).*

Por la katolikoj estas grava sin konstante firmigi en la kredo, kleriĝi en la kono de la Sankta Skribo kaj katekismo. Aŭskulti tion, kion diras la Sankta Patro, kiu estas gvidata per la Sankta Spirito, legi **liajn enciklikojn – tio estas eksplikoj de la Sankta Skribo por la nuna tempo**. Nuntempe estas ĉio tio akirebla por ĉiu, same kiel ankaŭ multe da plua kristana literaturo.

Ni vivas en la tempo kaj en la socio, kiu denove estas pagana, kaj povas veni ankoraŭ pli grandaj provoj por kristanoj, kiam ni devos atesti pri Kristo. Ni estu por tio preparitaj, **por ke ni ne mistrafu la eternan vivon**. Ni elpetu de la Sanktan Spiriton ankaŭ donacon de la distingado. L**a Sankta Spirito instruos vin pri ĉio...** *(Joh 14,26)*.